# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo junio 2026**


## VIZITO AL LA REGIONA BIBLIOTEKO

La kultura aktivado, kiun ni proponis en la pasinta numero, fine sukcesis, sed kun kelkaj ŝanĝoj. Ni mendis gvidatan viziton al la Regiona Biblioteko de Madrido, kaj oni ĝin akceptis, sed ĝi okazis fine la 27-an de majo pro sanproblemoj de la personaro de la institucio. La gvidita vizito estis sufiĉe ampleksa, kun detala montrado de la konstruaĵoj de la komplekso, mem tre interesaj pro la historia kunteksto (ĝi estis la unua sidejo de la bierfabriko "El Águila"), kaj de la instituciaj laboroj de la biblioteko, kiu entenas historiajn trezorojn, rilatajn al la libroj kaj al aliaj tipoj de dokumentoj.

Poste restis iom da tempo por viziti la ekspozicion "Valle-Inclán en Madrido", muntitan en la sama konstruaĵo.






## REMEMORIGO PRI LA SOMERAJ KONGRESOJ

Ni denove memorigas pri la tre altiraj Esperanto-renkontiĝoj okazontaj dum tiu ĉi somero, en Hispanio kaj internacie.

Inter la 14a kaj la 18a de julio okazos la **84-a Hispana Esperanto-Kongreso** en Portugalete, Biskajo, tre proksime al Bilbao. Vi povas trovi ĉiujn necesajn detalojn, inkluzive de la provizora programo kaj planitaj ekskursoj, en la retejo kongreso.esperanto.es. Ni rekomendas ke vi rezervu la ekskursojn kaj la finan bankedon kiom eble plej rapide, ĉar por tio ekzistas limigita nombro de partoprenantoj. Vi ankaŭ povas aliri tie la aliĝilon kaj la liston de registritaj partoprenantoj, jam pli ol cento. Kaj en la adreso https://kongreso.esperanto.es/videoj/ vi povas spekti videon pretigitan ĝuste por la evento.

Tuj poste, inter la 19a kaj la 26a de julio, okazos la **Kongreso de la Sennacieca Asocio Tutmonda** (SAT) en Leono. Vi povas legi la ĉefajn informojn en la retadreso: https://sat2026leono.org/, inklude de la programo, kiu havos kiel bazan temon "Paco kaj militoj. Datreveno de la Hispana Enlanda Milito".



Ankaŭ aparte interesa estas la **Internacia Junulara Esperantista Kongreso** (IJK), kiu ĉi-jare okazos tre proksime al Barcelono, en iama monaĥejo en la urbeto Tiana, inter la 9a kaj la 16a de aŭgusto, kun riĉa programo, kaj kiu koincidos kun la eklipso videbla en la nordo de la Iberia Duoninsulo. Vi povas viziti la retejon ijk2026.tejo.org por legi ĉiujn informojn kaj registriĝi per la aliĝilo. Jam ĉirkaŭ 200 homoj aliĝis, sed, bedaŭrinde, tro malmultaj el aliaj regionoj de Hispanio ekster Katalunio.

Fine memoru ke la **111-a Universala Kongreso de Esperanto** okazos en Graco (Graz, Aŭstrio) ekde la 1a ĝis la 8a de aŭgusto 2026, kun ĉ. mil aliĝintoj, el kiuj 25 el Hispanio. Vidu la plenan kotiztabelon ĉe https://uea.org/kongresoj/kotiztabelo, kaj por partopreni, aliĝu ĉe: https://uk.esperanto.net.

## KAJ ANKAŬ EN AŬTUNO

Se bedaŭrinde vi ne povos ĉeesti renkontiĝojn en somero, ni jam informas vin ke interesaj kongresoj estos partoprenindaj en oktobro, proksime de ni.




Specife, la **22-a Andaluzia Kongreso de Esperanto** okazos en Malago de la 9a ĝis la 12a de oktobro, koincide kun la kunveno de la Esperanta Naturamikaro (ENA). Vi povas trovi komencajn detalojn pri loĝado kaj la programo, kaj ankaŭ registriĝi, en tiu ĉi retejo: https://www.esperanto.ac/.

Ankaŭ dum la feri-ponto de la 9a ĝis la 12a de oktobro, la **41-a Kataluna Esperanto-Kongreso** okazos en Reus. Detaloj estas haveblaj en la retejo: https://kongreso.esperanto.cat/.

Ni informos pli detale pri tiuj ĉi renkontiĝoj en venontaj eldonoj de nia bulteno.

## RENKONTIĜOJ EN MADRIDO

La unuasabata kunveno okazos la 6an de junio, je la 18:30, ĉe la polpejo Pulpería O Miño, en la strato Idioma Esperanto, numero 2 (proksime al metrostacio Alsacia). Memoru ke ĝi estas malferma al iu ajn, sendepende de la lingva nivelo kaj ke la babilado estas libera, sen programo.

Memoru ankaŭ ke la sidejo malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie. Ni organizas babiladojn, kaj foje teatrajn prezentadojn kaj aliajn aktivadojn.

## PLIAJ INFORMOJ

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En Fejsbuko vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia reto *Bluesky* vi povas trovi nin ĉe: https://madridaliceo.bsky.social.

Ankaŭ eblas aliĝi al la ŭacapa grupo, por la madridaj esperantistoj, per la ligilo https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g.

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com